



# TEA-BULTENO

12<sup>A</sup> JARO

JANUARO - FEBRUARO 2009

NUMEROJ 1-2

**Aforismo: malmultvorta vero, sed dirita tiel, ke ĝi surprizas pli ol mensogo.**

*Giovanni Papini, itala verkisto (1881-1956)*

## Karaj Tea-Anaro kaj Legantaro!

Ĉu veras, ke oni sopire atendas, komence de Nova Jaro, ian vortumadon de la redaktanto? Ĉu vere devo? Ĉu ne sufiĉas simpla bondeziro, punkto kaj fino? Ja, ĉiam tiu malferm-artikolo por mi estis kialo de maldormemo dumnokta, antaŭ finpretigo de la Bulteno! Jarfine elfosi el la menso (kaj ĉefe el koro!) taŭgajn vortojn por diri, nu ĝuste ... kion? Ĉu la kutimajn aferojn? Ĉu doni voĉon al kaŝitaj esperoj, kiuj daŭre restos nuraj revoj, ĉar realo ja estas la rekta malo de ĉio ajn imagita en plej belaj sonĝoj?

Ĉu retrorigardi al pasintjara asocia agado kaj, atenteme kaj sen antaŭjuĝoj, pritaksi la faritaĵojn, por redakti artikolon dissemitan per laŭdoj aŭ mallaŭdoj, objektivaj aŭ malobjektivaj kritikoj, riproĉoj kaj plendoj...? Pro kio? Ĉu fine entute oni ĝin ellegos? Kaj ĉefe, ĉu el tiuj eventualaj kritikoj oni vere povos elĉerpi ian profiton aŭ, kontraŭe, nur sentos tiujn kiel atakon personan?

Nu, post trafolumado kaj supraĵa legado de jam 11 jarkomencaj artikoloj de mia/via TEA-BULTENO (jes, de tiom da tempo ĉi senpretenda asocia informilo aperas), ĉifoje mi decidis, ke ja dum la jara asembleo oni aŭdos, per la prezidanta, sekretaria kaj kasista raportoj, resumon kaj analizon de la dumjara TEA-aktiveco - tio, miaopinie, sufiĉos por bildigi al si la tutan konkretan agadon de triesta esperantistaro: nun estas la plej bona momento por pripensi nur pri la estonteco!

Antaŭ ni staras dekdu-monata periodo dum kiu oni strebu trovi propran spacon por persona engaĝiĝo en la programaro realigenda kaj realigota.

2009: 100-jariĝo de Internacia Fervojiista Esperanto-Federacio enkadre de la 61<sup>a</sup> Kongreso (23-29 majo) kaj 150<sup>a</sup> datreveno de naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (jarfine, historia ekspozicio). Gravaj kaj laborigaj eventoj, por kies efektivigo estas bezonataj vi ĉiuj - manpleno da bonvoluloj ne sufiĉas por sukcese aranĝi tiaĵojn. Ĉiu ajn povas kontribui eĉ per plej eta faro, ĉar sablero plus sablero plus sablero... formas altajn dunojn! Bonan Novan Jaron al vi ĉiuj kaj vivu Esperanto kaj TEA!

Via redaktanto

## ROLŜANĜIĜO DE UŜONO

Nuntempe la afero iomete trankviliĝis, sed dum la lastaj monatoj ĉiuj amaskomunikiloj preskaŭ frenezigiĝis.

Vi ekŝaltis radion ĉe radiojurnalo: unua sciigo temis pri ekonomia krizo. Kurzo de petrolbarelo: ĉu plialtiĝas? ĉu malpliĝas? Kvazaŭ ni ĉiuj estus financistoj!! Kontraŭe, ni estas malriĉaj aŭtomobilistoj rimarkantaj subitan pliiĝon por plenigo de benzino, kiam la kurzo plialtiĝas, kaj ... **neniun malaltiĝon** kiam ĝi malpliĝas.

Due, borsokurzoj. Tokio: minus 3,28% - Hongkongo minus 2,84% - Milano: "post malfermo stabila, alvenis vendondegoo, alportanta malsupreniĝon de kurzoj kaj FIAT-akcioj perdis 12 punktojn, dum ENI nur 9". Ĉu ni ĉiuj estas borsospekulantoj? Kiom da homoj, proporcie, posedas akciojn, obligaciojn (ĉu konverteblajn, ĉu hipotekajn)? Plimulto el ni estas normalaj virinoj kaj viroj, kiuj, vizitante superbazon aŭ fruktovendejon, konstatas konstantan pliiĝon de prezoj.

Vespere ni spektis televidodebaton: pluraj homoj - ho, vere kleraj deputitoj kune kun pluraj ist(in)oj: industrist(in)oj, ĵurnalist(in)oj, sindikatist(in)oj ktp - eĉ krie kvereladas pri la deveno, la nuno, la estonto de tiu ĉi financa krizo: ĝis kiam ĝi pludaŭros? kiaj estos sekvoj? ĉu decas savi bankojn aŭ nur garantii la ŝparemulojn? ktp ktp. Vortoj, pliaj vortoj, ĉiamaj vortoj, vortoj, vortoj.

Kelkfoje iu mencias la devenon, la originon, sed ĉiuj ŝajne hontas paroli pri tiuj eldiablaj novaj "virtualaj" financproduktoj, lasta fonto de tio, kion ĉiuj nun nomas katastrofo, eĉ monda.

Vere hontinda afero. Imagu: bankoj (kian bildon vi havas pri bankistoj? ŝajne seriozaj homoj, mastrantaj monon, do nepre fidindaj), asekurkompanioj, investoagentejoj, kiuj daŭre interŝanĝis "virtualaj paperoj"-n koncerne eventualajn riskojn pri nesolvebleco de homoj, nenion alian posedantaj, fakte ne riĉaj, kiuj, do, ne kapablas doni la bezonatajn garantiojn. Al tiuj homoj, bankoj disponigis hipotekajn pruntojn por aĉeti domon, eĉ pli ol la necesan sumon: la t.n. 105% da pruntoj. Freneza fariĝis tiu interŝanĝo de "virtualaj paperoj", ĉar per ĉiujfoja interŝanĝo gajneblas makleraĵo: por banko, por agentejo pri konstruaĵoj, por asekura agentejo, por



## Rakontu al mi fabelon... Kial la korvoj estas nigraj- Indiana fabelo

En foraj, tre foraj tempoj, kiam tero kaj gentoj sur ĝi estis ĵus kreitaj, ĉiuj korvoj aspektis blankaj kiel neĝo. Tiam homoj malhavis kaj ĉevalojn kaj pafilojn kaj ferajn armilojn. Tamen ili sukcesis akiri manĝaĵojn en sufiĉa kvanto por vivteni sin, ĉasante bubalojn.

Sed por ĉasi tiajn bestegojn nur per ŝtonaj armiloj, postkurante ilin piede, multon oni devis peni, eĉ vivoriske. Tiam jam malfacilan ĉasadon pli komplikigis la korvoj, pro iliaj amikaj rilatoj kun la bubaloj. Alte en la ĉielo ŝvebantaj, ili havis bonegan superrigardon super ĉio okazanta en la prero kaj – ĉiufoje kiam ili ekvidis la ĉasistojn alproksimiĝantajn al bubala grego – tuj alflugis al sia amikaro kaj per krioj kaj flugilbategoj alarmis la tutan aron.

“Kaŭ, kaŭ, kaŭ, gekuzoj, estas alvenanta la ĉasistaro! Jen tie, de tiu gorĝo ili kaŝavancas. Jen, jam tiun monteton ili supreniras! Atentu, atentegu! Kaŭ, kaŭ, kaŭ!” Je tiu signalo la bubaloj diskuradis malorde, kaj sekve de tio fiaskis... bonŝanca ĉasado! Kaj la homoj eksuferis pro malsato.

Tial oni decidis plurope interkonsiliĝi por eltrovi solvon al tiu problemo. Inter la korvoj – ne hazarde tion oni rimarkis – estis iu birdo vere granda, du fojojn pli granda ol ĉiuj aliaj, tre verŝajne la gvidanto. Iu maljuna, saĝa Ĉefo leviĝis kaj ĉi tion sugestis: “Ni devas kapti tiun grandan blankan korvon kaj puni lin ekzemplodone. Aŭ tiel ni agos aŭ malsato daŭre suferigos nin!”

Do, li forportis el sia ŝirmejo bubalan felegon, ankoraŭ havantan kaj kapon kaj kornojn, ĝin surmetis sur la ŝultrojn de juna kuraĝulo, kaj tiel diris: “Nepo mia, miksiĝu en la bubalaron. Ili pensos, ke vi estas unu el ili, tio favoros vian klopodon kapti la grandan blankan korvon.”

Maskita kiel bubalo, la junulo rampis atenteme kaj singarde tra la brutaro, ŝajnigante ke li estas paŝtanta. Tiuj vilaj, kolosaj bestoj fakte tute lin malatentis. Intertempe la ĉasistoj eliris el siaj kaŝejoj, pretaj sagpafi. Kiam tiuj estis tre apudaj al la grego, la korvoj fluge alvenis, kiel kutime, kriante averte: “Kaŭ, kaŭ, kaŭ, kuzoj, la ĉasistoj estas proksimaj murdocele, atentu iliajn sagojn! Kaŭ, kaŭ, kaŭ!” kaj, kiel kutime, misedise la bubaloj forkuris. Ĉiuj fuĝis, escepte de la juna ĉasisto kaŝita sub la felego, kiu ŝajnigis esti paŝtinta tute trankvila kaj senzorga. La granda blanka korvo glise alteriĝis, sidiĝis poste sur la ĉasista ŝultro kaj, nerveze bategante la flugilojn, alkriis: “Kaŭ, kaŭ, kaŭ, ĉu vi surdas, frato? La ĉasistaro tute proksimas, jen ĝi sur la monteto! Haste savu vin!” En tiu momento la kuraĝulo eligis sian manon el sub la felo kaj kaptis la birdon je la kruroj. Per ŝnuro el kruda ledo li ligis la piedojn de la granda korvo kaj la alian ekstremaĵon de la sama ŝnuro alligis al ŝtonego. Furioze la korvo baraktis kiel fiŝo ekster la akvo, sed vanege.

Denove la saĝuloj kunvenis por decidi pri la destino de tiu korvo. “Pro li ni malsatsuferis cent kaj pli da fojoj, kiel puni lin?” “Ni tuj bruligu lin!”, proponis iu kolera ĉasisto, kaj, antaŭ ol iu ajn promptu lin haltigi, per forta tirego elprenis lin el la manoj de la juna ĉasisto kaj ĵetis la birdegon en la fajron kune kun ŝnuro, ŝtono kaj ĉio. “Jen, estu ĝi inda leciono por ĉiuj!”, tiel li deklaris. Memkompreneble la ŝnuro, alligita al la ŝtono, forbrulis en unu momento, kaj la granda korvo povis save elflugi el la fajrujo. Sed duonbruletis kelkaj plumoj, eĉ karbiĝis iuj, ne plu tiel blanka li fine estis. “Kaŭ, kaŭ, kaŭ” li ekkriis forflugante kiel eble plej rapide, “neniam plu mi alarmos la bubalaron, kaj samtiel faru la tuta korva komunumo! Tion mi ĵure promesas! Kaŭ, kaŭ, kaŭ!”. Kaj ekde tiam ĉiuj korvoj iĝis nigraplumaj.

komercaj agentoj, por borsagentoj kaj ... por ĉiuj, kiuj kapablis sin enŝoviĝi en la kolosan aferon (aŭ ĉu pli bone kolosan trompon?).

Sed tiuj “virtualaj paperoj” estis kiel malplenaj boteloj de vino, kiuj aukciiĝas ĉiam pliig-preze dank’ al prestiĝa etikedo. Sed kiam vi intencus regali vian eminentan gaston per, supoze, *Brunello di Montalcino* akirita je 125 €, vi trovos la botelon tute malplena. Kaj eĉ ne Jesuo kapablus ĝin mirakle plenigi per bonega vino, kiel ĉe la edziĝo en Kana!

Intertempe ankaŭ la interezoj pliiĝis kaj pro tio la malriĉaj domposedantoj ne povis plu pagi la monatajn partojn de propra ŝuldo. Pro ekzistantaj hipotekoj, la koncernaj domoj fariĝas posedo de la bankoj, kiujn ili devintus vendi por rehavigi al si la monon. Sed ... aĉetantoj tute ne troveblas. Troa altiĝo de interezoj malebligas estigi pruntojn por aĉetado de domoj, kiuj restas ne vendataj: la bankoj por reakiri propran monon malaltigas domoprezojn. Ekmarŝas do terura diabla cirklo. Ĝis disfalo de la merkato.

Finfine ni renkontiĝas kun tiu magia vorto: **Merka-**to, la libera merkato, kiu laŭ la saĝeguloj pri ekonomiko kapablus ĉion ordigi, ĉion irigi taŭgmaniere al la ĝustaj celoj. Ĉio pli kaj pli kaj pli, sen iu ajn regulo: la fama malreguligo [*deregulation*], kiu, de

la usona Prezidinto Reagan ĝis nun, regis la merkaton de Usono kaj laŭeble de la tuta terglobo tra la tutmondigo. Kaj vere per tiu tutmondigo alvenis al ni ne nur la “usona vivovojo” [*the american way of the life*], sed krome tiu ĉi tutmonda ekonomia krizo. Eble iom simile okazis ankaŭ en la jaro 1929. Tiam mi, kiel infano, memoras nur grandajn ĵurnaltitolojn kaj la faman 90-kvoton: stabila fiksigo de 1 US-dolaro egala al 90 liroj.

Falis do, kroma flanko de tiu prestiĝa bildo, kiun Usono kapablis estigi pri si mem ekde la fino de la malvarma milito. Aliaj flankoj jam ŝanceliĝis – tiu politika: fakte la militojn estigitajn tra la mondo, Usono ne kapablis ĝis nun finvenki – tiu socia: fakte en Usono, okaze de stratakcidento, vi devas posedi kreditkarton aŭ asekuron por rajti je transportiĝo al hospitalo. Se ne paroli pri daŭra latentata homapartigo kaj pri la drogumula medio.

Do, depost tiu ĉi ekonomia krizo, ĉiuj spertuloj antaŭvidas reĝustigon de la usona rolo rilate al la aliaj mondaj potencoj, aparte kun la emergantaj landoj: Ĉinio kaj Barato.

Ĉu eble reĝustiĝos ankaŭ la rolo de la angl-usona lingvo kiel altrudita interpopola komprenilo?

Eble. Ni estu pretaj.

VIGLO



## Triesto kaŝita

### "Ĝigoĝin" kaj "Bàrbara"

Duone de Aleo XX *Settembre* imponas palaco, gastiganta la kinejon *Ambasciatori* (Ambasadoroj), antaŭtempe nomita *Eden*.

Ĉi domo estis konstruita en 1907 de arkitekto Giuseppe Sammaruga. Laŭ formo kaj strukturo ĝi tre similas al alia verko de la sama arkitekto, nome la milana Palaco *Castiglioni*, starigita en 1903. Ambaŭ palacoj, florstilaj, surhavas kariatidojn tre pezajn sur la fasado. La du inaj figuroj estis baptitaj "Ĝigoĝin" kaj "Bàrbara", laŭ la humura kutimo de triestanoj. Envere tiuj statuoj ricevis la nomon de du famaj "stelulinoj" laborantaj en la tiama, tuta, apuda, prostituejo, famkonata laŭ la nomo "Orienta Vilao". La kinejo *Eden* estas unu el la plej malnovaj en Triesto kaj havas tre kuriozan historion, rilate al ties nomo. En 1938 iuj militemaj perfortuloj detruis la kinejan ŝildon, pretekste ke — anstataŭ ties reala signifo de paradiza oazo — ĝi estis la nomo de la angla ĉefministro Anthony Eden, kiu tiutempe akre kritikis la diktatorajn reĝimojn kaj italan kaj germanan.

Tiu kinejo, iom pli poste, ricevis alian nomon: *Supercinema Principe* (Superkinejo Princo), sed tuj post 1949, sekve de forfalo de monarkia estrado, oni forviŝis tiun "Princo"-n. Kelkajn jarojn poste ĝi estis ree nomita *Eden*, kaj tiu nomo restis ĝis la

1990aj jaroj, kiam — koincide de restaŭrado — denove oni ŝanĝis ĝin al la nuna *Ambasciatori*. Kiom da nomoj por sama kinejo: kio tute ne ŝanĝiĝis dume, estas la kromnomoj de la du belulinoj ornamantaj la fasadon!

### La sinagogo de Opicina kaj Babelturo

En 1804, *Opicina*, vilaĝo situanta sur la karsta altebenaĵo, je ĉirkaŭ sep km de la urbocentro, havis entute 618 enloĝantojn kaj 118 domojn. Post 100 jaroj iom ŝanĝita estis la demografia situacio: la loĝantaro konsistis el 1544 personoj, el kiuj 785 viroj kaj 759 inoj. Domoj ja estis entute 295. En tiu periodo la bonstataj familioj de Triesto elektis tiun vilaĝon kiel somerumejon: la altebenaĵa aero estis tre pura, la kuirmaniero tre apetitiveka, kaj relative malgranda la distanco inter ĝi kaj la urbo. Estis konstruitaj tial nombraj loĝejoj kaj elegantaj vilaoj, kiujn ĉirkaŭis belegaj ĝardenoj. El tiuj riĉaj familioj, multaj estis hebre-devenaj, tiom ke en *Opicina* ek-estis sufiĉe granda komunumo, kiu eksentis la bezonon havi propran kultejon.

En *Via Nazionale* 89, ĉe la Edukejo "Don Bosco", ekzistas ankoraŭ nun tiu, kiu — ŝajne — estis la antikva sinagogo. Iam, en pli posta tempo, la konstruaĵo iĝis magazeno, nune preskaŭ ne plu uzebila pro sia ruiniĝstato. Je iu ekstremo de la ĝardeno staras tre stranga konstruaĵo, la tiel dirita "Babela Turo". Temas pri belvidejo, surhavinta iam kiosketon. Ĝi estis tiel baptita pro ties simileco kun pluraj renesancaj prezentaĵoj de la fama biblia turo.

## Mallonge pri...

**Agrablaj surprizoj por UK-anoj en Bjalistoko:** en ĝia koro, ĉe la urba Foirplaco, elegante staras



**ESPERANTO CAFE!** Unika loko, interne de historia konstruaĵo: en ĝi via buŝo estos karesita de bongustegaj desertoj (ekz. la kuko

"Esperantka"); vian nazon delikate tiklos tonika kaf-aromo dum via orelo ĝuos esperantan alparolon de ĉarma kelnerino. Tie eblas krome spekti ekspozicion, rilatan al vivo kaj akiraĵoj de la kreinto de Esperanto kaj al aspekto de iama Bjalistoko. Jam nun vizitu ĝin ĉe <http://esperanto-cafe.pl/home.eo>

**Por kiuj alvenos trajne:** je la 14<sup>a</sup> de decembro 2008, okaze de la ŝanĝo de fervoja horaro, ĉe la kajoj de la Bjalistoka stacidomo estis muntitaj grandformataj tabuloj, dulingvaj. Sur tiuj, informoj kaj priskribo de simboloj de la fervoja horaro estas legeblaj en la pola kaj en Esperanto.

**Kaj se vi timas ne sukcesi,** ene de venontaj sep monatoj, meti en vian ŝparporketon sufiĉan monon por partopreno en Bjalistoka UK, jen monbiletoj kiuj certe permesos al vi dormi pli trankvilajn dormojn! Ĉu mi sukcesis veki viajn scivolemon kaj atenton? Nu, bone, jen eta klarigo pri kio temas!

Antaŭ nelonge estis fondita "Sennacia Banko", kiu fiere lanĉis la novan mondan monon, nomitan... tutsimple "Mono"! La evento oficiale okazis ĉe *Arcus Project* en Moriya, Japanio, komence de decembro 2008.

Kialo de tiu fondo la granda maljusteco en la mondo, pro la abisma diferenco de kostoj de nutradaj

varoj. Kaj ankaŭ la malpraktikeco de deviga monŝanĝado okaze de vojaĝoj.

Tiel asertas la projektisto: "Mono ne dependas de iu ŝtato aŭ iu specifa geografia teritorio. Estas la monda mono, kiu antaŭenigos internacian komercon kaj samtempe reduktos malegalecon inter landoj. Baldaŭ, kiam la homoj konscios la avantaĝojn, vi povos uzi ĝin ĉie en la mondo".

Kiel videblas ĉe la bildo, sur bileto 100-mona aperas la portreto de nia Zamenhof, dum en la malantaŭa flanko, estas heliko. Fone, fajne skribita, la devizo: "Unu Mondo, Unu Lingvo, Unu Mono". Por sekureco de mono-posedantoj, kontraŭfalsada protektaĵo malebligas obligadon de la biletoj, kiel decas ĉe ĉiuj "aŭtentikaj" monbiletoj (filingrano, numeroj, paperkonsisto...). Kaj fine, kiel lanĉoferto, la Sennacia Banko interŝanĝas Monojn laŭ la fiksa kurzo:



100 Monoj por ¥1000 (enoj). Ho, diable!, vi perdis eksterordinaran okazon, ĉar tiu oferta daŭris ĝis la 31<sup>a</sup> de decembro. Nun, ni jam en 2009<sup>a</sup> jaro! Sed ne malesperu! Certe estos plia ŝanco ankaŭ por vi!

Memkompreneble, "por la intereso de la posedantoj de Monoj la Sennacia Banko saĝe investos la enspezon en novaj artprojektoj", tiel asertas la direktoro, s-ro Daniel Salomon, de la Sennacieca Bando (ho, pardonu, mistajpon! Intenco estis skribi: Banko!). Interesitoj povas mem kontakti la iniciatinton, sendante retmesaĝon al [daniel@heliko.org](mailto:daniel@heliko.org). Rete vi povas viziti, tamen ankoraŭ prilaborendan, ttt-ejon: [www.heliko.org](http://www.heliko.org).

## THORSEN-APOGO AL SES BIBLIOTEKOJ

Ses bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo ROMA KAJ POUL THORSEN je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller estis subvenciitaj la librokolektoj de Srilanka Esperanto-Asocio (265 €), Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (Kroatio; 260 €), Centro Internacia de Esperanto (Madagaskaro; 200 €), Esperanto-klubo de Elec (Rusio; 190 €), **Triesta Esperanto-Asocio (Italio; 175 €)**, kaj Esperanto-Biblioteko de Limoĝio kaj Okcitanio (Francio; 160 €).

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997, kiam UEA ricevis mondonacon por tiu celo de ges-roj Thorsen, ambaŭ forpasintaj en 2006. Bedaŭrinde tre malmultaj kluboj kaj asocioj kun biblioteko utiligas tiun ĉi ŝancon por ricevi librojn senpage. Pro malmulteco de petoj ankaŭ ĉi-foje subvencio estis asignita al ĉiu petinto. Du bibliotekoj estis subvenciitaj ankaŭ jam pli frue.

Petoj pri subvencioj en 2009 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15<sup>a</sup> de oktobro. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

TTT-ejo dediĉita al la vivo kaj verkaro de Poul Thorsen (1915-2006) troviĝas je la adreso [www.poulthorsen.dk](http://www.poulthorsen.dk).

## FILATELO KAJ ESPERANTO

### Poŝtmarkoj pri la 100-jara UEA

Okaze de la 93<sup>a</sup> UK en Roterdamo UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la kongresa simbolo. Ĝi fariĝis grandega sukceso kaj praktike elĉerpiĝis jam dum la UK. Malgraŭ multaj petoj ĝi ne estis reeldonita, ĉar, post la paso de la UK, ĝia temo ne plu estis aktuala. Nun ĝi estas ŝatata objekto ankaŭ ĉe neesperantistaj kolektantoj, kiuj en retaj aŭkcioj pagas por ĝi multe pli altan prezon ol la originala vendoprezo.

La furoro de la kongresa poŝtmarko tamen instigis UEA mendi novan markon pri temo, kiu daŭre aktualas: la jubilea jaro de UEA. La nova marko aperis en novembro 2008 kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por ordinara letero en Nederlando. Ĝi montras la jubilean simbolon de la 100-jara UEA, kiu estis desegnita de Guillem Sevilla, kun la teksto "100 jaroj universala esperanto-asocio".

La jubilea poŝtmarko estas vendata en folioj de 10 markoj kaj ĝi estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas 5,50 € (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). Ankaŭ tiu ĉi marko estis eldonita en tre limigita kvanto.

Malmultaj informoj, bedaŭrinde, ĝis nun je dispono pri la nova poŝtmarko aperinta, oficiale, en *Bosnia i Hercegovina*. Sur ĝi la simbolo pri 100-jariĝo de UEA, la verda stelo, kaj gramatika lecioneto: *esper-i verbo*; *esper-o substantivo*; *Esperanto*; *esper-antisto*. Ĝi videblas en reta aŭkcio ĉe DelCampe. Espereble niaj amikoj el Bosnio-Hercegovino bonvolos havigi al ni pli da detaloj pri tiu ĉi ŝtata emisio.



En Aŭstrio, ĉiam celebre de la UEA-datreveno, mag. Walter Klag eldonis poŝtmarkon, surhavantan mondon kaj la skribaĵon: *esperanto.net*, kio indikas la disvastigadon tutmondan de Esperanto interrete.

Pliajn informojn pri ĝi eblas ricevi de la iniciatinto mem, sendante mesaĝon al lia adreso: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

## Januara programo

9 vendredo	20h00 - Malmuntado de desegnaĵ-ekspozicio kaj kripo
13 mardo	19h00 - Ordigo de hemeroteko; preparlaboroj prikongresaj
16 vendredo	20h00 - Astrologia mapo de L. L. Zamenhof
18 dimanĉo	10h00 - Jara Asembleo
20 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
23 vendredo	20h00 - Enigmoj en Esperanto
27 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
30 vendredo	20h00 - Nia 100-jariĝo - filmo de Edvige

## Februara programo

3 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
6 vendredo	14h40 - Alirprogramoj de RADIOUNO 20h00 - Tiaj ni estis! Diapozitivaj de Anita
10 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
13 vendredo	20h00 - Piron kaj mi: kun bildoj prezentas Anita
17 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
20 vendredo	20h00 - La mita Atlantido (el Vikipedio)
24 mardo	19h00 - Preparlaboroj prikongresaj
27 vendredo	20h00 - Arkitekturo en Prago

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

**Redaktanto:** Elda DOERFLER - [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)  
**Sidejo:** Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj  
**tel/fakso:** (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936  
**Retoj:** [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it); [nored@tiscali.net](mailto:nored@tiscali.net)  
**Grupa ttt-ejo:** //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina  
**Poŝta adreso:** CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio  
**Poŝtĉekkonto N°** 10834349



## Rezultoj de la 3<sup>a</sup> Internacia Konkurso Kristnasko, bilde kaj poezie

Atingis Triestan Esperanto-Asocion 114 verkoj el 11 landoj: Brazilo,

Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Italio, Kroatio, Litovio, Pollando, Ukrainio kaj Vjetnamio. La aŭtoroj aĝis inter 6 kaj 14 jaroj.

Ekde la 5<sup>a</sup> ĝis la 19<sup>a</sup> de decembro 2008, vizitis la ekspozicion, muntitan ĉe TEA-sidejo, pli-malpli 250 personoj, el kiuj pluraj esprimis, per skriba voĉo, sian ŝaton de la diversaj verkoj. Laŭ la indikoj de vizitintoj kaj ĵurio, la premioj estis tiel aljuĝitaj:

### Desegnaĵoj:

**KATEGORIO A** - Erik JAKOVLEV, 6 jaroj - Klaipeda (Litovio);

**KATEGORIO B** - Isabella CAPITANIO ROSSATTO, 10 jaroj - São Paulo (Brazilo)

**KATEGORIO C** - NGUYỄN QUANG Minh Nhật, 12 jaroj - Ho Chi Minh (Vjetnamio);

### Poeziaĵoj:

Bianca HELLEN, 12 jaroj - Taguatinga (Brazilo).

**SPECIALA MENCIO:** la IKUE-grupo de Goma/RDKongo, pro kortuŝaj kaj sentoplenaj desegnaĵoj kaj poeziaĵoj.

La gajnintoj ricevos la premiojn, konsistantajn el libroj, KD-aj kursoj pri Esperanto, ŝlosilringoj, puzzleoj kaj aliaj, depende de la konkerna aĝo, dum al ĉiuj konkursintoj estos senditaj partoprendiplomoj.

Koran dankon ni adresas al ĉiuj kiuj bonvolis helpi nin en ĉi iniciato, precipe gazeto-, revuo-, ĵurnalo-redakcioj, ĉu retaj ĉu paperversiaj, kiuj disinformadis pri la konkurso; al Esperanto-geinstruistoj kiuj kuraĝigis la lernantojn partopreni en ĝi kaj al ĉiuj kiuj iel, tre bonvoleme, ĉu surloke ĉu aliloke, sindone kontribuis al la sukceso de la 3<sup>a</sup> Internacia Konkurso pri Kristnasko.

## Internacia Ekspozicio de Infanaj desegnaĵoj pri **Amikeco**

UKRAINIA KLERIG-CENTRO, el Kijivo, Ukrainio, invitas partopreni en ĉi ekspozicio ĉiujn infanojn tra la tuta mondo. La temo de la verkoj povas esti ajna, gravas ke ĉiu, rigardante la desegnaĵon, eksentui ion bonan. Celu estas montri la disvastiĝon de esperanto sur nia planedo kaj alvoki al interhoma amikeco. Eblas partopreni ankaŭ per mallongaj rakontoj, esperantlingvaj, pri urbo aŭ lando, aŭ per elaboraĵoj faritaj el plej diversa materialo.

La aŭtoroj devas klare skribi, en esperanto kaj en sia nacia lingvo, la personan kaj familian nomojn, naskiĝdaton, en kiuj klaso kaj lernejo ili lernas, kaj la poŝtan adreson.

La limdato estas la 30<sup>a</sup> de aprilo 2009. Dum majojunio la ekspozicio estos vizitebla en lernejoj kaj universitatoj de diversaj urboj en Ukrainio.

Ĉiu sendinto ricevos dankleteron. La aŭtoroj de la plej plaĉaj verkoj ricevos premiojn. La verkon sendu al: Svetlana POGORELAJA— Ab.k. 54 - KIJIVO - UA-03035 UKRAINIO

## ESPERANTO E ACCANIMENTO TERAPEUTICO

La scabrosa questione dell'accanimento terapeutico ha imperversato negli ultimi tempi su tutti i mezzi d'informazione – giornali, radio, TV e internet – con dichiarazioni di esponenti politici e religiosi, dibattiti sull'etica e sulla filosofia morale, tirando in ballo la Costituzione repubblicana e provocando persino cortei, veglie, raccolte di sottoscrizioni e altre simili manifestazioni.

Che cos'è l'accanimento terapeutico? Da più o meno 50-60 anni, con il sostegno e la collaborazione di altri rami della scienza – dalla fisica (dai raggi X in poi), fino alla biologia molecolare – la medicina ha fatto progressi strabilianti. Sono state debellate, quasi in tutto il mondo, malattie endemiche come la malaria, il vaiolo e la paralisi infantile, per non parlare delle grandi pestilenze, si controlla il diabete, si curano i tumori, si trapiantano organi vitali. Tutto ciò, ed altro ancora, con il nobile scopo di tutelare la vita, di preservare quel delicatissimo equilibrio di elementi – acqua, oligominerali, sali, enzimi, vitamine, proteine e quant'altro – che permette ad un organismo di rimanere vivo e vitale. Fino a quando una causa – imponderabile, intrinseca, esterna, accidentale – non alteri irreparabilmente quell'equilibrio. E la vita finisce.

La scienza medica però, riesce ultimamente a tenere sotto controllo quegli equilibri anche nei casi di coma, ossia – dice il Zingarelli – quella "condizione morbosa comune a più malattie, caratterizzata da perdita della coscienza, della motilità, della sensibilità". Uno stato che può risolversi benignamente in qualche ora o giorno, durante i quali, oltre ai farmaci, vengono somministrati anche gli elementi necessari alla vita, di cui sopra. Oppure può trasformarsi in "coma profondo" irreversibile: ma talvolta, anche così la somministrazione continua, per giorni, mesi, anni, nella speranza di ... ..

E si parla allora di accanimento terapeutico.

Ma l'esperanto come entra in questa storia, direbbero i nostri affezionati lettori.

È che la condizione attuale dell'esperanto somiglia molto a quella situazione.

Ci si affanna, a destra e a manca, per incontrare persone, istituzioni, prendere contatti, partecipare a manifestazioni, congressi, incontri, organizzare mostre, conferenze e seminari, nella convinzione che ogni azione sia buona per ... mantenere in vita l'esperanto. "Plue teni la torĉon", si dice.

Ma l'esperanto non dev'essere "mantenuto in vita" nella speranza di ... ..

L'esperanto o è vivo e vitale, e serve e si mette in pratica per conoscere altre persone, e si adopera per visitare altri luoghi, altre culture, per ampliare il nostro modo di vedere, per comprendere criteri diversi di pensiero, per adeguarci ad altri stili di vita, per arricchire il nostro spirito, per migliorarci ... ..

Oppure è meglio staccare il "sondino" e lasciare che riposi in eterno tra le braccia del British Council.

Sta a noi scegliere, decidere e trovare la strada.

Adesso.

VIGLO